# Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2001 numero 3-a: majo / aŭgusto



Redakcio:
Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5
Retpoŝto: gacond@bluewin.ch
✆ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32
Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND


## Ni konatiĝu kun Willy NÜESCH

Kiuj partoprenis la kunvenon de SES en Bern la 7-an de aprilo, tiuj havis la ĝojon renkontiĝi kun Willy NÜESCH ekspozicianta du librojn de Rudolf STEINER, kiujn li esperantigis kaj mem belaspekte eldonis, tio estas la verkoj *La edukado de la infano el la vid-punkto de la spiritoscienco* (40 paĝoj, prezo: 4 euroj aŭ CHF 6) kaj *Kiel oni akiras ekkonojn pri la superaj mondoj?* (157 paĝoj, Prezo: 18 euroj aŭ CHF 27 ).

Siatempe, kiam mi min pedagogie fakiĝis por instrui al subkapablaj kaj al karakter-perturbitaj infanoj, tiam multe interesis min la klerigaj vid-punktoj de Rudolf STEINER kaj la pedagogio praktikata en antropozofiaj lernejoj, kiujn mi vizitis en Genève kaj Basel.

Mi legis kun granda atento en franca versio plurajn verkojn de Rudolf STEINER, kaj ĝuste inter ili la unue menciitan libron, kiun mi povis nun remediti dank'al la altnivela esperanta versio de Willy NÜESCH.

La relego de tiu verketo re-konvinkis min pri la praveco de la antropozofia didaktiko kaj samtempe ĝojigis min, ke en Svislando vivas tradukisto tiel lerte majstranta nian lingvon.

(Artikolfino sur la paĝo 27-a)

# Rememorigilo

## SES-estraro

**Bruno GRAF**, prezidanto, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen/Bern. ✆: 031 921 44 59. Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch.
**Dietrich WEIDMANN**, vicprezidanto, PF 301, 8034 Zürich. ✆: 01 251 50 25. Retpoŝto: info@esperanto.ch.
**Nicole MARGOT**, sekretario, Chemin des Lys 4, 1010 Lausanne. ✆: 021 653 14 67. Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.
**Elisabeth LAUPER**, kasisto, République 13, 2300 La Chaux-de-Fonds. ✆: 914 39 34. Retpoŝto: elilauper@bluewin.ch.

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4
Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

## Anoncoj

| Paĝo | Neesperantistoj & komercaj | Esperantistoj & nekomercaj |
|---|---|---|
| 1/8 | CHF 40 | CHF 20 |
| 1/4 | CHF 70 | CHF 35 |
| 1/2 | CHF 110 | CHF 55 |
| 1/1 | CHF 180 | CHF 90 |

## *SES informas*

### Redaktaj datlimoj

Por ***SES informas*** N° 2001-4 (septembro-oktobro): 20-a de aŭgusto.
N° 2001-5 (novembro-decembro): 20-a de oktobro.
N° 2002-1 (januaro-februaro 2002): 20-a de decembro 2001.
N° 2002-2 (marto-aprilo): 20-a de februaro.
N° 2002-3 (majo-aŭgusto 2002): 20-a de aprilo.

## Svisa kalendaro

### Maje

07: Lausanne LES-kunveno
10: La Ch-de-Fds CDELI studrondo
17: Basel ESB Makaronia kunveno
17: Luzern LES-kunveno
19: Lausanne Conférence EC Migros
19: La Ch-de-Fds CDELI studsabato
24-27: La Ch-de-Fds KCE Internacia komunista konferenco
25: Genève: Conférence Claude Piron

### Junie

05: Genève Stelo-kunveno
06: Wil EKW-kunveno
13: La Ch-de-Fds CDELI studrondo
16: La Ch-de-Fds CDELI studsabato
16: Lausanne LES-ekskurso

21: Luzern LES-kunveno
23-24: La Ch-de-Fds KCE monatfino
27: La Ch-de-Fds CDELI studrondo
28: Basel ESB Minigolfa kunveno
30: Luzern LES Ekskurso en Aarau
30/1 julio: Ch-Fds KCE monatfino

## Julie

04: Wil EKW-ekskurso
14-20: SAT 74-a Kongreso en Nagykanizsa en Hungario
14-23: Intenacia Eo-Konferenco pri Karolo Piĉ en Straznice, Ĉeĥio
17 ĝis 20 aŭgusto: Ch-de-Fds KCE kurs-sesio
21-28: 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb en Kroatio
29 ĝis 5 aŭgusto: 57-a TEJO-Kongreso en Strasbourg en Francio

## Aŭguste

12: Wil EKW-ekskurso
20: Redakta datlimo por *SES informas*
23: Luzern LES Promenada kunveno

## Septembre

05: Wil EKW-kunveno
20: Luzern LES-kunveno
22: La Ch-de-Fds CDELI stud-sabato
26: Genève Conférence Claude Piron

## Oktobre

01: Lausanne: LES-kunveno
03: Wil: EKW-kunveno
18: Luzern: LES-kunveno
20: Redakta datlimo por *SES informas*
20: La Ch-de-Fds CDELI studsabato
27-28: La Ch-de-Fds KCE Ekumena monatfino.

## Novembre

05: Lausanne LES-kunveno
07: Wil EKW-kunveno
15: Luzern LES-kunveno
17: La Ch-de-Fds CDELI studsabato

## Decembre

05: Luzern: LES Zamenhofa festo
05: Wil: EKW Zamenhofa vespero
16: Lausanne: LES Zamenhofa festo
20: Redakta datlimo por *SES informas*

## 2002

## Januare

07: Lausanne: LES-kunveno
18: Luzern LES-kunveno
19: La Ch-de-Fds CDELI studsabato

## Februare

04: Lausanne: LES Ĝenerala kunveno
16: La Ch-de-Fds CDELI studsabato
20: Redakta datlimo por *SES informas*

Ne forgesu sendi viajn sciigojn ĝis la 20-a de aŭgusto, por ke ili troviĝu en la taŭga rubriko kaj en la svisa kalendaro de *"SES informas"* 2001-4 (septembro-oktobro).

# Retadresaro

La redakcio de *Eventoj* aktualigas listegon de retadresoj de esperanto-organizaĵoj kaj de diskutgrupoj esperantlingvaj. Tiu ĉi estas konsultebla sub la retadreso: http://www.eventoj.hu/snd-list.htm

# Vivo de SES

## Protokolo

### Ĝenerala Kunveno de la 7-a de aprilo en Bern

**1. Komunikoj de la prezidanto.**

Malferme al la kunveno la prezidanto Bruno GRAF esprimas sian kontenton rilate al la bona reprezento de nia membraro. Se bedaŭrinde mankas membroj el Tiĉino, la aliaj regionoj de Svislando estas bone reprezentataj.

28 personoj ĉeestas, inter kiuj s-ro Laszló DUNAI, kiu vizitas unuafoje la Ĝeneralan Kunvenon de SES. Li tuj aliĝas al nia societo. Origine de Vojvodio (Jugoslavio) li instaliĝis jam de kelkaj jaroj en nia lando kun sia familio.

**Senkulpiĝoj:** Ueli HAENNI, Andy KÜNZLI, Angelo MELLINI, Nelida WEIDMANN. Claude GACOND legas senkulpiĝan leteron de Perla MARTINELLI publikita kiel aldonaĵo al la protokolo. En tiu ĉi letero la vicprezidantino de SES anoncas sian demision de la estraro.

**Tagprezido:** Mireille GROSJEAN estas elektita tagprezidanto per 25 voĉoj, 1 kontraŭ, 2 sindetenoj.

La asembleo observas unuminutan silenton memore al nia honora membro Lilly SCHAERER.

**Tagordo:** Dieter ROOKE faris proponon, kiu ne respektis la statuton, ĉar ĝi estus bezoninta 3 subskribojn por esti konsiderata kiel pritraktebla en la Ĝenerala Kunveno. Tial lia propono estis pritraktita matene ekster la Ĝenerala Kunveno kadre de la Rendevuo de la aktivuloj. Kaj sekve al la propono de Dieter ROOKE la ĉeestantoj al la rendevuo aldonis celon al la societo: tio estas levi la lingvan nivelon de la membraro.

Dieter ROOKE reintervenas komence de la Ĝenerala Kunveno: "Mi faris proponon ne akceptitan kaj mi ŝatus scii, kiujn proponojn atendas la societo." Sekvas iom da konfuzo, ĉar la asembleo ne komprenas la signifon de la demando, kaj la tagprezidantino petas, ke oni revenu al la tagordo. Sekve al ŝia interveno Dieter ROOKE, ne kontenta, foriras el la salono.

Tuj poste la tagordo estas unuanime akceptita.

## 2. Elekto de la voĉnombrantoj.

Kiel voĉnombrantoj Nancy FONTANNAZ kaj Lucien DAHAN estas elektitaj.

## 3. Protokolo de la lastjara Ĝenerala Asembleo.

Sonia BRUN: "Perla MARTINELLI diris en sia letero, ke la enketo organizita de la estraro koncerne la kolektivan abonon al *Literatura Foiro* ne estas laŭ la protokolo, sed mi nenion vidas en la protokolo, kiu subtenas ŝian opinion."

Didi WEIDMANN: "Letero al la Ĝenerala Asembleo ne bezonas respondon. Perla MARTINELLI ne protestis siatempe kontraŭ la protokolo."

Bruno GRAF: "Tamen Perla MARTINELLI ne inventis, mi memoras, ke oni parolis pri kotizoj de SES kombinitaj kun tiuj de la lokaj societoj, sed pri tio ne okazis decido."

Alain FAVRE: "Mi proponas, ke la letero de Perla MARTINELLI aperu en *SES informas* kun repliko de la prezidanto."

La protokolo estas akceptita per 20 voĉoj kaj 7 sindetenoj de membroj, kiuj ne ĉeestis la pasintan Ĝeneralan Kunvenon.

## 4. Jarraporto, jarkalkulo, bilanco 2000 kun raporto de la kaskontrolantoj.

La jarraporto aperis en *SES informas*. La jarkalkuloj estas nun disdonataj, ĉar la kasistino havis gravan komputilan problemon. Komence de tiu ĉi jaro riparisto erare viŝis la tutan librotenadon de SES. Ŝi devis haste ĉion refari.

Elisabeth LAUPER: "Ni malfermis konton ĉe WIR-banko, kaj fermis unu en Crédit Suisse. Restas unu kuranta ŝparkonto por ĝiri la interezojn el la kas-obligacioj en Crédit Suisse. La mono de Agado 2003 ĉe Crédit Suisse iras al WIR-banko."

Claude GACOND: "Nia kasistino bonege laboris malgraŭ la mal-agrabla eraro de la riparisto. Pro tio la jarkalkulo kaj la bilanco ne povis aperi en *SES informas.*" Li aldonas: "CDELI kolektis monon, ĉar Jacques-André HUMAIR - la direktoro de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds - deziras, ke CDELI mem zorgu pri sia komput-ila sistemo. Sed estas konvene, ke la mono kolektita ne eniru la kontojn de la komunumo antaŭ la decidiga momento, tial mi direktis la koncernan monsumon al la libroten-ado de SES."

Elisabeth LAUPER: "En la libro-tenado mi kunigis la elspezojn de la estrarkunsidoj kun tiuj de la kun-venoj sub la rubriko (kunvenoj kaj kunsidoj). La unuaj estis antaŭe en la rubriko administraj kostoj, kio laŭ

mi estas eraro. Ili false troigis la administrajn kostojn."

Paul SCHERER: Nome de la kaskontrolantoj mi konstatas, ke ne normalis la fakto, ke la bilanco ne aperis en *SES informas* kaj ke lastmomente la kaskontrolantoj estis kunvokitaj. Sed tio kompreniĝas kaŭze de la komputilfuŝo, kiu okazis al nia kasistino. Multaj kotizoj de la jaro 2000 mankas, ĉar la admona letero ne estis sendita sufiĉe frue. Sed ankaŭ tio kompreniĝas, ĉar la kasistino laboras por la unua jaro en la estraro kaj ne kutimas pri ĉio. La librotenado estas en ordo kaj la kaskontrolantoj proponas ĝin akcepti kaj malŝarĝi la estraron."

La jarraporto estas aprobita de 26 voĉoj, 1 sindeteno.

### 5. Buĝeto 2001.

Bruno GRAF: "Tiun ĉi jaron ni pagos nur la duonon de la kolektiva abono al *Literatura Foiro*, CHF 2'400, tio estas donaco de LF-koop kaŭzita de la jubileo de LF. La reabono al Argus kostos CHF 1'500, sed enspeziĝos CHF 675 dank'al la subabonoj proponitaj al la lokaj societoj, kaj menditaj de preskaŭ ĉiuj societoj."

Dietrich WEIDMANN miras, ke nur CHF 2'500 estas buĝetitaj por varbado. Esperanto-Societo Zürich ekzemple buĝetas CHF 5'000 por la sama tasko.

Sonia BRUN miras pri la alta kosto de *SES informas*.

Claude GACOND rimarkigas, ke la duono de la CHF 2'900 buĝetitaj koncernas sendokostojn, kaj ke ĉirkaŭ 400 numeroj iras propagandcele al nemembroj, ke li ofte pagas el sia poŝo kostetojn, kaj ke parto de la sumo povas esti kalkulita kiel propagando, kaj ke estos librotenita tiel venontjare.

DIETRICH WEIDMANN, konsiderante, ke dum krizaj jaroj la elspezoj povas superi la enspezojn, kaj ke jam CHF 1'000 pagotaj por *SES informas* koncernos varbadon, proponas buĝeti CHF 6'000 por varbado.

Bruno GRAF preferas prezenti ekvilibran buĝeton, kaj jam sen la propono de Dietrich WEIDMANN la buĝeto montras malgajnon de CHF 3245.

Anita ALTHERR proponas por varbado kompromisan sumon de CHF 4'000.

Tiu sumo estas akceptita de 14 membroj kun 8 sindetenoj kaj 2 kontraŭaj voĉoj.

La buĝeto kun la modifo estas unuanime akceptita.

### Agadplano.

Bruno GRAF informas pri la regionaj kunvenoj de tiu ĉi jaro 2001. Al Nicole MARGOT estas taskita organizo de regiona prelegaro en Romandio pri la Jaro de la

Lingvoj kun la helpo de Claude GACOND kaj de Mireille GROSJEAN. La dato ankoraŭ ne estas fiksita kaj devus esti diskutita kun aliaj organizantoj.

Dietrich WEIDMANN: ESZ planas kunvenon en orienta Svislando kaj deziras fiksi la daton de tiu aranĝo kune kun la organizantoj de aliaj SES-kunvenoj.

Christiane SIXTUS POT: "En Genève okazos la 26-an de septembro franclingva prelego de Claude PIRON pri la Jaro de la Lingvoj.

Mireille GROSJEAN anoncas, ke ILEI ĉeestos en Genève, de la 5-a ĝis la 8-a de septembro, konferencon de la Buroo de la Minoritataj Lingvoj, ankaŭ okaze de la Eŭropa Jaro de la Lingvoj. Ŝi disdonos tie informilojn pri esperanto.

### 6. Kotizoj 2002.

Claude Gacond raportas pri la historio de nia kolektiva abono al *Literatura Foiro:* Fine de la jaroj okdekaj, kiam SES troviĝis sen redaktoro por sia revueto *Svisa Esperanto-Revuo*, oni provis solvi la problemon per eldono de la bulteneto *SES informas* redaktita de Fritz LIECHTI kaj aldone per kolektiva abono al *Literatura Foiro*, kiu alportis kulturan enhavon al nia membraro. Sed rapide la svisa kontribuo en *Literatura Foiro* magriĝis dum kreskis la elitismo de la revuo, kaj sekve multaj ricevantoj ĉesis interesiĝi pri ĝi. Ni devas instigi niajn membrojn aboni diversajn revuojn anstataŭ favori nur LF-on.

Mireille GROSJEAN: "Ĉu la membroj havu la liberon elekti?"

Alain FAVRE: "Ĉu SES plu peros LF-n?"

Mireille Grosjean: "Povus esti la tasko de s-ro SCHEIDEGGER."

Nicole MARGOT: "Ĉu plu povos funkcii kolektiva abono al LF por la interesatoj?"

Dietrich WEIDMANN: "La estraro devus zorgi pri favoraj abonkostoj al diversaj gazetoj."

Christiane SIXTUS POT: "Ĉu ankaŭ al *La Gazeto*?"

Bruno GRAF: "Tio estas komplika. La estraro provos negoci por la dezirantaj membroj favorprezan abonon por *Literatura Foiro* aŭ por *Heroldo de Esperanto*. Se LF-koop ne akceptos, ni turnos nin al alia revuo."

Mireille GROSJEAN: "La adreso de s-ro Scheidegger devus aperi en SES-informas."

La asembleo voĉdonas la sekvan proponon: *La membroj havu la eblecon elekti la legotajn gazetojn, la abono al LF ne plu estu inkludita en la kotizo.* Aprobita de 27 voĉoj.

### Nova propono pri kotizoj

Nicole MARGOT: "Ni ne volas malfavori la emeritojn, kiuj estas

granda parto de nia societo. Ankaŭ ilia kotizo malaltiĝos je CHF 10. Kaj nun ni povas konsideri, ke emeritoj ofte pli bonfartas finance ol mezaĝuloj."

Dietrich WEIDMANN: "Doni rabaton al emeritoj estas nun ekse. La junuloj kaj mezaĝuloj havas familiojn kun multe da elspezoj."

Nancy FONTANNAZ rimarkigas, ke tamen kelkaj emeritoj vivas nur pere de AVS, do per malmultaj rimedoj.

Dietrich WEIDMANN: "Je unuopaj kazoj la kasisto povu malaltigi la kotizon."

Bruno GRAF: Unuopulo povas pagi pli malatan kotizon, ni neniam forĵetos membrojn pro financaj malfacilaĵoj."

La propono de la estraro pri la kotizoj estas akceptita per 27 voĉoj.

## 7. Adapto de la statuto.

artikolo 8, literoj b kaj d. Forpreni la substrekitajn partojn.

b. infanoj aŭ geknaboj, junuloj, emeritoj kaj geedzoj pagas reduktitan jarkotizon.

d. Por esti dumviva membro oni devas unufoje pagi la 20-oblon de la baza kotizo. Por emerito temas pri la 20-oblo de ilia reduktita baza kotizo.

Akceptita per 27 voĉoj.

## 8. Diversaĵoj.

Bruno GRAF: "Ni nun parolu pri la Agado 2003. En SES informas vi povis legi la buĝetan planon verkitan de Claude GACOND."

Sonia BRUN: "Temas pri alta sumo."

Claude GACOND: Pretigo de enciklopedia verko kostas multe pli ol oni ĝenerale imagas. Ĉiu informopeto ekzemple pri simpla naskiĝdato ĉe komunuma administracio kaŭzas kostojn. Se ni ne helpus al Andy KÜNZLI, la enciklopedio ne povus aperi en 2003. La kvalito de pluraj kontribuoj de Andy KÜNZLI aperintaj en festlibroj atestas pri la seriozeco de lia historiista laboro. La antaŭvidita subvencio koncernas nur la redaktan aktivecon, poste venos tutcerte aliaj kostoj por la eldono. Kiam mi estis elektita kiel prezidanto de SES en 1987, nenio estis buĝetita por la centjara jubileo de esperanto. De tiam SES kolektis monon por la festo de la centjara jubileo de SES mem kaj la sumo kolektita preskaŭ atingas nun CHF 15'000. Se ni ne pretiĝas akurate, neniu diskonigo pri nia jubileo okazos en 2003.

Dietrich WEIDMANN scias, ke Andy KÜNZLI estas la plej taŭga por tiu laboro.

Alain FAVRE: La enciklopedio gigantos. Ĉu ĝi aperos en esperanto?

Claude GACOND: Jes tutcerte, kun eblaj resumoj en aliaj lingvoj.

Alain FAVRE: En tiu kazo mi timas, ke ĝi ne atingos la lingvistan medion.

Claude GACOND respondas, ke kiam fakulo bezonas informojn, li kapablas eklerni esperanton, tion li konstatas ĉe CDELI, kaj li memorigas al Alain FAVRE, ke li venis al esperanto, ĝuste ĉar faklibro pri likenoj publikiĝis esperantlingve.

Voĉdono: 23 voĉoj por, 1 kontraŭ, 1 sindeteno. 2 personoj devis foriri antaŭ la voĉdono.

La membraro tiel konfirmas la buĝetan decidon de la estraro aperintan en SES informas 2001-2 paĝo 12-a.

Protokolis Nicole MARGOT

La protokolo estis kontrilita kaj akceptita de la prezidanto Bruno GRAF je la 17-a de aprilo 2001.

## Protokolaj aldonaĵoj

### 1. Letero de Perla Martinelli

Al la Ĝenerala Kunveno de SES en Berno, 7-an de aprilo 2001

Estimata prezidanto,
Karaj geamikoj.

Mi tre bedaŭras, ke mi ne povas esti hodiaŭ inter vi, interalie ĉar mi havas ion gravan por deklari. Pro respekto al la statuto, mi komunikas unuavice al la suverena organo de Svisa E-Societo, nome al la Ĝenerala Kunveno, mian demision de la posteno de vicprezidanto kaj entute de la estraro.

La demision mi ne komunikis pli frue ankaŭ ĉar mi ne volis krei embarason al SES. Laŭstatute, devus esti en la estraro almenaŭ unu reprezentanto de la itallingva regiono. Kaj ĉar ne estas facile trovi tian kandidaton el Tiĉino, mi lasas nun al SES tutan jaron por serĉi mian anstataŭanton: la estraro restas legitima ĝis la venonta Ĝenerala Kunveno eĉ se nur kvarpersona kaj sen itallingavano.

Mi demisias unuavice ĉar **ĉi tiu estraro ne plenumis la ĉefan taskon kiun la lasta Ĝenerala Kunveno komisiis al ĝi pasintjare.** Se mi restus estrarano, mi kvazaŭ konsentus pri ĉi tiu manko de respekto al la samideanoj, kiuj tiu-okaze denove honoris min per sia fido.

Kiel vi certe memoras, pasintjare la Ĝenerala Kunveno ne aprobis la proponon de kelkaj membroj duonigi la aliĝkotizojn. Anstataŭ tio, la Ĝenerala Kunveno komisiis la estraron kontakti la lokajn grupojn kaj reveni post unu jaro kun nova propono, laŭeble interkonsentita kun la grupoj mem. Laŭ tiu nova propono, ekestus nova kotiza sistemo, kie la loka grupano pagus

en unu fojo kaj por SES kaj por sia grupo, kiel okazas ĝenerale ĉe aliaj Landaj Asocioj. Tiun proponon la estraro ne ellaboris, malgraŭ mia atentigo. Anstataŭe, la estraro relanĉis la proponon de duonigo de la kotizoj, tra dubinda referendumo. Mi havas grandan respekton pri referendumoj, formo de rekta demokratio pri kiu la svisoj povas rajte fieri. Sed mi petas vin kompari la enkondukon al kiu ajn referenduma baloto kun la absolute tendenca enkonduko kiun vi trovis en la balotilo dissendita al la SES-anaro, kie oni jam sugestis la respondon. Fakte mi mem ne voĉdonis, proteste al tioma mal-demokratio.

Sed tio ne estas la plej grava. Definitiva kaŭzo de malkonsento kun la estraro estas tiu parto de la propono kiu proporcie **damaĝas gravan membrokategorion: la emeritojn,** kiuj devus pagi kiel plena kotizanto. Tiun proponon evidente mi ne subskribis.

Estas fakto, ke en tiel malgranda kaj malforta organizo kia estas SES, la estraro povas funkcii nur se ĝi estas harmonia laborgrupo. Mi bedaŭrinde ne sentas tiun etoson en ĉi tiu estraro, tial mi lasas mian lokon al alia bonvolulo kaj revenas al aliaj okupoj je la servo de Esperantio.

Mia demisio de la estraro tamen ne signifas demision de SES, kies dumviva membro mi fariĝis por instigi ankaŭ aliajn tiamaniere subteni la societon. Mi restos en SES kiel simpla membro, ĉiam preta helpi se necese.

Kaj mi kaptas la okazon por tutkore danki la samideanojn, kiuj pasintjare reelektis min per la plej alta nombro da voĉoj, kaj simpatie rememori ĉiujn gekolegojn kun kiuj mi havis agrablan kaj fruktodonan rilaton dum la jaroj de mia estraraneco.

Kun sinceraj bondeziroj,
Perla MARTINELLI
dumviva membro de SES

PS. Kompreneble, mi petas ke ĉi tiu letero estu publikigita en *SES informas*, kiel parto de la protokolo.

## 2. Repliko de la prezidanto

Tia malferma letero al la redaktoro, ne al la estraro kiel normalus, postulas klarigojn, kiel dezirite de membro. La demisio de Perla MARTINELLI, vicprezidanto, malpli surprizas min ol la maniero kaj la kialoj. Mi preskaŭ atendis la retiriĝon, ĉar ŝi ne plu partoprenis la du lastajn estrarkunsidojn kaj retpoŝtis dufoje, ke ŝi ne plu subskribas la decidojn de la estraro.

Mi ne komprenas la akuzon, ke la estraro ne plenumis la taskojn donitajn lastjare. Ni faris la enketon pri la kolektiva abono al *Literatura Foiro*, ĉar tio iĝis problemo pro la tro pezaj kostoj de CHF 4'800 jare. La rezulto konfirmis la necesecon kaj donis klarecon pri la deziroj de la membroj. La enketa letero estis aprobita de plimulto de la estraro. Por mi klaras, ke la vera kaŭzo de la kritiko estas la rezigno pri la kolektiva abono de *Literatura Foiro*, bedaŭrinde ne esprimita.

Laŭ la lastjara protokolo, aprobita kaj ne kontestita, ni ne devis kontakti la grupojn por trovi kombinitajn kotizojn. Ni devis submeti al la grupoj nian proponon pri novaj kotizoj kaj ekzameni nian kotizan problemon.

La malaltigo de la bazaj kotizoj estas unua paŝo kaj kondiĉo al kombinitaj kotizoj, ĉar grupa plus nuna svisa kotizoj iĝus tro altaj. Ni daŭrigos tiujn klopodojn kaj vidos, ĉu intereso ekzistas.

Kiam estrarano ne plu povas konsenti pri decidoj prenitaj kun plimulto, tiam bona kunlaboro ne plu eblas. Tiel la demisio de Perla MARTINELLI estas konsekvenca kaj mi respektas ĝin. Mi dankas ŝin, ke ŝi restas membro kaj laboros alimaniere por nia afero.

Bruno GRAF, prezidanto

## Esperantista babilejo

Aperis babilejo dediĉita por esperantistaj retumantoj, kies celo estas ebligi rektan kaj samtempan dialogadon inter esperantistoj uzantaj interreton. Ĝi troviĝas sur la retpaĝoj de Etno-Kulturo: http://www.esperanto.ch/etno-kulturo.

Stefano KELLER klarigas tiurilate: "Iru al la paĝo Babilejo kaj atendu la aperon de la enirejo al la ĉambro "Popoloj-Kulturo-Esperanto". Simple skribu vian nomon anstataŭ "Guest" kaj klaku al la butono "Join". Por ĉiam trovi iun en la diskutejo, estus necese, ke multaj esperantistoj vizitu ĝin, do diskonigu ĝian adreson. Tie vi povos ankaŭ rendevui kun geamikoj el la mondo. Nuntempe deĵoranto atendas la babilemulojn inter la 19h00 kaj la 19h15 laŭ GMT (21h00 eŭrope laŭ la somera tempo).

# 3. Jarkalkulo kaj bilanco 2000, buĝeto 2001

| JARKALKULO | Bugheto 2000 | Kalkulo 2000 | Bugheto 2001 |
|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | |
| Informado, varbado | 3'000.00 | 2'626.95 | 4'000.00 |
| Omagoj, laborrimedoj | 50.00 | 129.90 | 100.00 |
| Subvencioj, premioj, projektoj | 1'000.00 | 1'000.00 | 1'000.00 |
| Literatura Foiro | 4'800.00 | 4'800.00 | 2'400.00 |
| SES informas elspezoj | 2'500.00 | 2'858.45 | 2'900.00 |
| Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj) | 600.00 | 1'761.35 | 1'700.00 |
| Intershanjho servo (Dieter Rooke) | | 67.00 | 50.00 |
| Argus | | | 1'500.00 |
| Abono al revuo "Babylonia" | | 50.00 | 50.00 |
| UEA Kotizo | 250.00 | 109.20 | 120.00 |
| Administraj kostoj (afrankado, telfonkostoj, etc) | 2'300.00 | 849.80 | 1'000.00 |
| Bank kaj poshtspezoj | 200.00 | 197.66 | 200.00 |
| **Elspeza sumo** | **14'700.00** | **14'450.31** | **15'020.00** |
| **Enspezoj** | | | |
| Membrokotizoj | 6'500.00 | 7'069.00 | 6'500.00 |
| Abono sen membreco | 400.00 | 180.00 | 300.00 |
| Donacoj, heredjho | 1'100.00 | 1'148.73 | 1'100.00 |
| Agado 2003 | 500.00 | 404.45 | 500.00 |
| Argus enspezoj | | | 675.00 |
| SES informas enspesoj | | 347.00 | 200.00 |
| Bank kaj poshtinterezoj | 1'000.00 | 539.88 | 1'000.00 |
| **Enspeza sumo** | **9'500.00** | **9'689.06** | **10'275.00** |
| **Malgajno** | **5'200.00** | **4'761.25** | **4'745.00** |

| BILANCO | | AKTIVOJ | PASIVOJ |
|---|---|---|---|
| Poshtkonto | | 12'257.80 | |
| Kunranta sparkonto CS-ZH -40 | | 1'395.20 | |
| WIR banko | | | |
| Kasobligacioj CS-ZH | | 25'000.00 | |
| Agado 2003 - CS-ZH -40-1 | | 10'622.30 | |
| KCE favore SES | | 15'000.00 | |
| Sparkonto CS-ZH -40-2 | | 5'230.05 | |
| Sparkonto CS-Winterthur | | 9'417.10 | |
| UEA konto sesa-v | | 183.50 | |
| Inventaro | | 1.00 | |
| Ant. imp. bonhavo ce ESV | | 315.55 | |
| Transaj aktivoj | | 3'525.75 | |
| Transaj pasivoj | | | 1'340 15 |
| Agado 2003 | | | 1'440.00 |
| CEDLI - Claude Gacond | | | 13'209.60 |
| Kapitalo je 31.12.1999 | 71719.75 | | |
| **Malgajno** | 4761.25 | | |
| **Kapitalo je 31.12.2000** | 66958.50 | | 66'958.50 |
| | | **82'948.25** | **82'948.25** |

Elisabeth Lauper, kasistino, 31.03.2001

# Donacoj

**Donacoj en CHF al SES :** Lucienne DOVAT, Renens: 20; Nancy FONTANNAZ, Pully: 50; Odette FREGONARA, Genève: 45; Claude & Andrée GACOND, La Chaux-de-Fonds: 25; Walter GIANNINI, Zollikerberg: 25; Wolfgang GASSER, Vaduz: 30; Ernst GLÄTTLI, Brugg: 5; Rémy GRANDJEAN, Fontainemelon: 20; Marguerite JACCARD-BESSON, Château-d'Oex: 130; Marguerite JAYET, Morges: 15; Jeannine JEANNERET, Neuchâtel: 30; Tina LANZ, Clarens: 15; Jean-Jacques & Eliane LAVANCHY, La Tour-de-Peilz: 65; Jean RICHEZ, Genève: 20; Jimmy RIVIÈRE, Prilly: 50; Paul SCHERER, Emmenbrücke: 5; Elsbeth WALDER, Meilen: 15; Dietrich WEIDMANN, Zürich: 20; Henri WETTSTEIN, Versoix: 35; Sume: 650.

**Donacoj en CHF por la Agado 2003**:. Traugott Rinaldo AEBI, Muri b. Bern: 5; Lucienne DOVAT, Renens: 15; Nancy FONTANNAZ, Pully: 60; Claude & Andrée GACOND, La Chaux-de-Fonds: 20; Walter GIANNINI, Zollikerberg: 25; Marguerite JAYET, Morges: 15; Christiane SIXTUS POT, Perly/Genève: 45; Dieter ROOKE, Oensingen: 15; Elsbeth WALDER, Meilen: 15; Henri WETTSTEIN, Versoix: 35; Sume: 250.

**Donaco en CHF por CDELI**: Marguerite JACCARD-BESSON, Château-d'Oex: 130.

Nome de SES la kasistino Elisabeth LAUPER dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco.

## La ĉinumera alvoko

En tiu ĉi numero de *SES informas* kaŝiĝas pagilo al la poŝta konto de SES. Espereble pluraj legantoj pretos esprimi sian apogon al la "Agado 2003". Ĉi-numere ni mencias, ke ne nur en Svislando oni laboras por inde festi la jubilean jaron 2003, sed ankaŭ en Pollando, kie Tomasz CHMIELIK daŭrigas nelacigeble la pretigon de plena verkaro de Edmond PRIVAT, kiu ĝuste esperantiĝis en 1903. Do 2003 festos la centjariĝon de la veno al la zamenhofa lingvo kaj al la homarana humanismo de tiu grava pioniro de esperanto. Per la Agado 2003 ni esperas povi helpi al la eldono de antologio dulingva franca-esperanta de signifaj artikoloj de Edmond PRIVAT. Malavare kontribuu al la sukceso de tiu projekto per donaco al la "Agado 2003".

# Tutsvisa aktiveco

# CDELI


**Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia**
**Biblioteko de la Urbo**
**Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds**
✆ 032 967 68 55.
**Retpoŝto: gacond@bluewin.ch**


## Vizito de Herbert Mayer

### Direktoro de Internacia Esperanto Muzeo en Wien

La restado kvintaga de Herbert MAYER en La Chaux-de-Fonds estis fruktodona. Tranokta gasto de KCE li havis plurajn okazojn renkontiĝi kun Giogio SILFER kaj ties sindonemaj kunlaborantoj. Kaj kunsidoj ĉe CDELI kun Claude GACOND kaj Jacques-André HUMAIR, la direktoro de la biblioteko, tutcerte firmigis la ligojn inter IEMW kaj CDELI.

Kaj la vivoplenaj prelegoj dum la didaktika sabato de la 7-a de aprilo larĝigis la horizonton de la vigle interesata partoprenantaro veninta el Romandio kaj Alemanio. Ĉiuj unue lernis interrete konsulti la esperanto-datumbankon TROVANTO de IEMW. Sekvis historio de la muzeo, kiun fondis en 1927 la pensioniĝanta aŭstra fervojisto Hugo STEINER (1878-1969). Ĝis la fino de sia vivo tiu emerito dediĉis ĉiujn siajn fortojn al la kolekto kaj konservo de esperantaĵoj kaj planlingva materialo unue en iama ĉevalejo, antaŭ ol fine li povis akiri pli konvenan ejon en subtegmenta alo de Hofburg-palaco kiel fakon de Aŭstria Nacia Biblioteko. Herbert MAYER raportis kiel ekde 1985 li provas doni al la muzeo mem pli altiran forton kaj al ĝiaj planlingvaj kolektoj pli efikan signifon kadre de la fakoj de Aŭstria Nacia Biblioteko.

Posttagmeze la preleganto per trafe elektitaj ekzemploj poeziaj kaj prozaj donis al ĉiuj ekkompreno pri evoluaj karakterizoj de esperanto, lingvo en kiu la libroj ludis kaj daŭre ludas ĉefrolon. Kaj fine li raportis pri sia eldona aktiveco prezentante la laste aperintajn librojn kaj parolante pri "siaj" aŭtoroj.

Claude Gacond

## Didaktikaj studsabatoj

Claude Gacond senpage helpadas al la studantoj kaj instruantoj de esperanto per la regula organizo de didaktikaj studsabatoj okazantaj principe ĉe CDELI la 3-an sabaton de la monato ekde la 10h00 ĝis la 12h45 kaj ekde la 14h15 ĝis la 16h00. Komuna tagmanĝo okazas en najbara italeca restoracio.

**Venontaj studsabatoj:**

**Maje 19:** Rendevuo kun Karolo PIĈH: daŭrigo, kaj konatiĝo kun la projekto de Lingvo internacia de D-ro Esperanto (1887). Kun didaktikaj ekzercoj.

**Junie 16:** Lingvo-analizoj.

Kaj por tiuj, kiuj decidos tranokti: post-kursa promenado al farmdoma gastejo kaj substela reveno piede al La Chaux-de-Fonds. Dimanĉe migr-ado aŭtomobila aŭ trajna al bela ĵurasa loko kaj piedira migrado en la montaro kun tagmanĝo en kampar-ana gastejo.

**Postaj datoj: Septembre 22, Oktobre 20. Novembre 17, 2002 Januare 19, Februare 16.**

Rezervu ilin en via agendo.

**GRAVE:** Partoprenontoj al stud-sabato bonvolu sin anonci ĉu letere, telefone aŭ rete por faciligi al la instruonto(j) la pretigon de la renkontiĝo.

# KCE

**Kultura Centro Esperantista**
**Strato Postiers 27, Poŝtfako 311**
**2301 La Chaux-de-Fonds.**
**✆ kaj fakso: (032) 926 74 07.**
**kce.esperanto@bluewin.ch**

## Raporto

## Pasko ĉe KCE

Dum kvin tagoj ni travivis riĉigajn kursojn kaj du belajn ekskursojn al la akvofalo Sault du Doubs, tiu-momente tre impona, kaj al la sub-teraj muelejoj en Le Locle, kiu forte impresis nin. Agrablaj vesperoj estis organizitaj kun kantoj, ludoj, filmoj.

Stefano KELLER efike instruis la komencantojn eĉ dum la paŭzoj. La kurson de la progresantoj gvidis Stano MARĈEK. Mi miris, kiel lerte li laborigis nin laŭ nia nivelo: li tre pedagogie faris demandojn divers-nivelajn pri la aŭdvida kurso, kiun li mem pretigis. Ni lernis pli ol 200 novajn vortojn en kampoj tre diversaj: vivo familia, ĝardeno, urbo, ekskurso, metioj ktp. Stefan MACGILL ne povis veni gvidi la superan kurson kaj Giorgio SILFER anstataŭis lin. Lia kurstemo estis tre interesa: "Se pretigi novan kurs-libron, kion meti enen?" Ni studis

pri la diversaj tendencoj kaj identiĝoj, analizis instrumetodojn.

Laŭ raporto de Nancy FONTANNAZ

## Ĉirkaŭ Claude Piron

Psikologio en la ĉiutaga vivo estis la temo de la aprila monatfino. Kiel ĉiujare Claude PIRON grupigis ĉirkaŭ si tre interesatan publikon.

## Venontaj aranĝoj

**Maje 24-27** Internacia komunista konferenco (responsas IKEK)

**Junie 23-24 aŭ 30-1 julio** Omaĝo al Gaston WARINGHIEN kun Miĉel DUC GONINAZ kaj Perla MARTINELLI.

**Julie 31 ĝis 20 aŭgusto** Plurnivela Internacia Kursaro (PIK).

**Oktobre 27-28:** Ekumena oktobra monatfino kun pastro Bernhard EICHKORN kaj pastoro Adolf BURKHARDT.

Detaloj estas regule publikigataj en *"Heroldo de Esperanto"* kaj ankaŭ haveblaj ĉe la administrejo de KCE, CP 311, Postiers 27, 2301 La Chaux-de-Fonds. Tel/Fakso 032 926 74 07. Rete: kce.esperanto@bluewin.ch

La administrejo ankaŭ prizorgas alîĝon kaj loĝadon de partoprenontoj.

# LF-Koop

La ret-bulteno *Heroldo Komunikas* n° 109 informis la 30-an de aprilo, ke la bendofako de LF-Koop reaktivas post longa paŭzo.

La du ĵusaj produktoj estas la reeldono de *Dimanĉa koncerto* de Anjo AMIKA kaj la *Esperanta Songazeto* n-ro 12.

En ĝi:

Valerio MOTTOLA prezentas specimenojn de la napola kanzono intervjue kun la tradukinto Nicolino ROSSI.

William AULD deklamas, kun muzika fono, la unuan ĉapitron de *La infana raso*.

La teatrofako de LF-koop proponas la radiofonian adapton de *La vorta klaso* de Giorgio SILFER, kies teksto aperis en LF n°168 en aŭgusto 1997.

# Loka aktiveco

## Basel

**Esperanto-Societo Basel**
**PF 103, 4005 Basel**
**✆ 0049 76 214 57 12**
**Kunvenoj: 20h00 en Salono ĉe Haltingerstrasse 97**

### Raporto

#### *Sud-Rejna Kuriero*

Ekde la komenco de la jaro 2001 Esperanto-Societo Basel kunlaboras kun Mulhouse-Esperanto per la eldono de kvaron-jara komuna bulteno titolita *Sud-Rejna Kuriero*. Ni esperas grandan sukceson al tiu ĉi intergrupa kunlaboro, kiu certe estos fruktodona.

#### Sukcesa fondua vespero

Fondua vespero ĉe Erna DÖRING ekrenkontigis 13 grupanojn.

### Venontaj kunvenoj

**Maje 17:** Komuna makaronia manĝo ĉe Berthe SPALINGER

**Junie 28:** Minigolfado ĉe "Gün 80", rendevuo je la 19h00 apud la restoracio.

## Bern

### Neordinara kafo

Pasintan vendredon (6-an de aprilo) mi estis en Bern kaj tagmanĝis en restoracio Gfeller (am Baerenplatz). Post la manĝo mi mendis "espresso"-kafon, kaj mire rimarkis, ke la subtasa paperrondo surhavas la nomon *Esperanto*, nigre presitan, trastrekitan de ruĝa sinusoida linio, kun miaopinie estetike kontentiga efiko. Eĉ pli mire mi konstatis, ke la sama marko retroviĝas sur la taseto mem, sur la interna rando.

Nu, se vi iros al la retpaĝaro www.rosca.ch, kaj alklakos sur "Unsere Kaffeemischungen, kaj poste sur "Rosca Esperanto", vi ekscios ĉion pri la koncerna kafo, kiun, cetere, mi trovis bona.

Mi ne scias, kion fari el tiu malkovro. Ĉu proponi al la firmao aĉeton de stoko, ĉu da tasoj, ĉu da kafo, por disvendo inter esperantistoj? Ĉu konsili al la esperantistoj iri tien kaj ŝteli taseton por pruvi al

skeptikuloj, ke esperanto ja ekzistas? Ĉu proponi al la firmaaj uloj, ke ni reciproke reklamu, ni ilian kafon, ili nian lingvon?

Surprizite kaj perplekse salutas
Claude PIRON

# Genève

## Esperanto-Grupo "La Stelo"

**Case postale 188, 1211 GENÈVE 20**
**✆ 022 740 04 45**

**Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «*Aux Cheminots*», 7, rue des gares, Genève.**

# Raporto

## Ĝenerala jarkunveno 6-an de aprilo

11 partoprenantojn grupigis la ĝenerala jarkunveno de La Stelo, kiu disvolviĝis sub la prezido de Lucien DAHAN.

La kasistino Gilda PACE estis dankita kaj reelektita pro la perfekta tenado de la kontoj. La financojn de la grupo fakte helpas la donacemo de la presejo Raymond POT senpage eldonanta la informilon *Brasikfolio*, kiu pliboniĝis post kriza periodo, kio atestas pri la alveno de novaj kunlaboraj fortoj.

Decidiĝis modera altigo de la jarkotizo, daŭrigo de grupa agado plue efektivigata sen komitato, esploro pri nova renkontiĝejo pli kvieta ol la restoracio "Aux Cheminots", kaj reokazigo de publika prelego kun Claude Piron kiel parolisto.

## Ludvespero

Je la 3-a de aprilo 11 stelanoj partoprenis la monatan kunvenon, kiun Anita ALTHERR vigligis per ludoj, kiuj donu ideojn al ĉiuj grupgvidantoj. La ludantoj devis: skribi ĉe ĉiu besto ties voĉesprimon; listigi la verkojn de Edmond PRIVAT; rigardante sin de kapo ĝis piedoj listigi nomojn de vestaĵoj; legi klare kaj rapide stumbligajn frazojn. Imitinda vespero, ĉu ne!

## Venontaj kunvenoj

**Maje 25:** Conférence publique de Claude Piron: *Les langues: un monde fascinant.* 15h00: Uni Dufour, salon Piaget. Cotisation: CHF 10. (gratuit pour les membres de l'Université du 3ème âge.)

**Junie 5** Grupkunveno.

**Septembre 26:** Conférence publique de Claude PIRON: Uni Dufour.

# Lausanne


**Laŭzana Esperanto-Societo**
**Case postale : 389, 1009 PULLY**
**✆: (021) 729 58 02**
**<lausanne.ch @ esperanto.nu>**
**<http://www.esperanto.ch>**


Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

## Raporto

La kunveno de la 8-a de januaro vidis la grupanojn amuze ekzerciĝi paroligante pupojn teatrajn. Bona ideo, ĉu ne!

## Ĝenerala asembleo

La 5-an de februaro 14 grupanoj partoprenis la asembleon, kies detala protokolo aperis en la LES-Informilo 2001-3. Resume ni menciu, ke ĝin vizitis Pierre-Henri LOUP, la prezidanto de "Union des Sociétés locales". Decidiĝis modera altigo de la jarkotizoj. La renovigita komitato konsistas el Jaqueline VASSEROT, prezidanto; Yvette GOY, vicprezidanto; Charlotte BLANC, sekretario; François RANDIN, kasisto.

## Ekspozicio

Ekspozicio pri esperanto muntita de François RANDIN malfermiĝis je la 30-a de aprilo ĉe "Ecole Club Migros". Ĝi daŭros ĝis la 19-a de majo kun la intenco malfermi vesperan esperanto-kurson dum 5 lundoj ekde la 28-a de majo.

## Venontaj aranĝoj

**Maje 7**: grup-kunveno.

**19:** 9h00-12h00: Samedi Passion kun esperanto ĉe Ecole Club Migros kaj 20h00-22h00: Informprelego de François RANDIN ĉe Ecole Club Migros.

**Junie 16:** grup-ekskurso.

**Somere:** feria pasporto dum julio kaj aŭgusto.

**Septembre:** romanda kunsido en Genève.

**Oktobre 1, Novembre 5:**

**Decembre 16**: Zamenhofa festo.

**2002 Januare 7:**

**Februare 4:** Ĝenerala asembleo.

## Esperanto ĉe EPFL

Sukcese iniciatis studento en-kondukon de esperanto-kurso ĉe la fama laŭzana altlernejo EPFL. Rezulte de lia strebado, grupeto de universitataj kunlaborantoj kaj stud-entoj eklernis esperanton komence de aprilo. Temas pri profesoroj kaj studentoj pri matematiko, komunik-

ado kaj komputado. La kursdatoj estas fiksitaj ĝis la someraj ferioj 2001. La studhoroj disvolviĝas laŭ semajna ritmo sub la gvido de Stefano KELLER, iama plentempa instruisto kaj metodologo de esperanto ĉe KCE en kunlaboro kun Claude GACOND. Kontaktoj, ĉu fakaj ĉu amikecaj, estas bonvenaj je la sekva retadreso: ethno-culture@worldonline.ch.

## Viviga vojaĝo

Hungara Biologia Asocio kun sidejo en Lausanne iniciatis novspecan servon, kies esenco baziĝas sur kompleta viv- kaj mond-koncepto. Ĝi ankaŭ organizas esperanto-kursojn en Hungario. Temas pri multflanka vojaĝ-organizado, kies karakteron difinas ses bazaj kriterioj. Ĉar ĝi decidis ekuzi esperanton por siaj internaciaj aranĝoj, ĝi petis en Lausanne la kunlaboron de Stefano KELLER.

Kiu volas ricevi informojn pri la planitaj vojaĝoj , kursoj kaj restadoj kaj pri la konceptoj aluditaj, tiu petu detalan informilon en esperanto al Internacia Kunordiga Centro, Viviga Vojaĝo, Chemin de la Motte 22, 1018 Lausanne. ✆ 078 772 04 08, aŭ retpoŝte al:
ethno-culture@worldonline.ch

# Luzern

**Lucerna Esperanto-Societo**
**Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke**
**✆ 041 280 46 12.**

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg, Ettiswil-Ruswil kaj de Neuenkirch.

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - okazas paroliga kunveno de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz Brügger en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

## Venontaj kunvenoj

**Maje 17:** ĵaŭde 19h30: paroliga leciono, 20h00: Biografietoj de famaj komponistoj kun Paul SCHERER.

**Junie 06:** en Simplon.

**21:** ĵaŭde 19h30: paroliga leciono, 20h00: Demandluda ekzameno pri la Originala Verkaro de ZAMENHOF kun Dieter ROOKE.

**Junie 30:** sabate ekskurso kun Anĝelo MELLINI, kiu okazos per ĉiu ajn vetero. Oni kunhavu piknikon kaj trinaĵojn por kolbasa rostado.

Horaro: 09h20: Renkontiĝo ĉe la Würstlistando ĉe la stacidomo de Emmenbrücke; 09h30: aŭtomobilado al Aarau; 10h15: alveno ĉe la bestparko Aarau-Roggenhausen kaj renkontiĝo kun la sovaĝbesta gardisto DÖBELI; 12h00: pikniko;

14h00: forpiedado; 14h20: alveno ĉe ĉevalstalo en Wildegg kaj kaleŝado; 15h45: alveno ĉe Käptn Jo, rest. Aarfähre Biberstein kaj ĝuo de atrakcioj; 17h00: rekaleŝado al Wildegg; 17h40: forveturo al Emmenbrücke; 18h00: eventuale komuna vespermanĝo en Emmenbrücke.
Ĉiu interesato ekrilatu kun Anĝelo MELLINI, Büntacher 21, 5626 Hermetschwill petante la detalan informilon kun aliĝilo. La partoprenkosto estas CHF 35.

**Julie 04:** en Simplon.

**Aŭguste 23:** ĵaŭde 19h00: kolektiĝo ĉe "Emmenbaum" por promenado kaj poste humura literaturo kun Soja BRUN.

**Septembre 05:** en Simplon.

**20:** ĵaŭde 19h30: paroliga leciono, 20h00: Infanoj kaj bestoj kun Monika RUCKLI.

**Oktobre 18:** ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: Historio kaj fabrikado de salo kun Annelis DETTLING.

**Novembre 07:** en Simplon.

**15:** ĵaŭde 14h00: paroliga leciono, 14h30: kompilado de la programo 2002.

**Decembre 05:** merkrede 14h00-16h00 en Simplon: Zamenhofa posttagmezo kun Franz BRÜGGER kaj Sonja BRUN.

**2002 Januare 09:** en Simplon.

**18:** vendrede 19h30: paroliga leciono, 20h00: Vojaĝo tra Venezuelo kun Margrit E. BRÜGGER.

# Kantono de Neuchâtel

## Studaj rondoj ĉe CDELI La Chaux-de-Fonds

Ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND
Kelkfoje marde.

## Plenkreskula rondo

Marte kaj aprile ĉiuj legis el *Kon Tiki*, faris ekzercojn el la nova eldono de *Paŝoj al plena posedo* de William Auld, babilis, studis pri la poezia disvolviĝo dum la pionira periodo de esperanto (1887-1919).

## Venontaj kunvenoj

**maje 10 (escepte ĵaŭde)**
**junie 13 kaj 27**

**Geknaboj:** Regule la mardon de la 17h00 ĝis la 17h45.

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

**Stanislaw POCHANKE, Letenstrasse. 70, 9500 Wil. ✆ 071 911 68 30**

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

### Raporto

Dum la ĝenerala kunveno de la 2-a de februaro elektiĝis Barbara POCHANKE kiel nova sekretario de la klubo pro translokiĝo de Dawid POCHANKE al 7000 Chur, Sägenstrasse 8.

### Venontaj kunvenoj

**Junie 6:** Prelego de T. WADOLOWSKA el Pollando.

**Julie 4:** Sub la gvidado de Barabara POCHANKE ekskurso al Nieselberg kun kolbasa rostado.

**Aŭguste 12**: Tuttaga ekskurso al Wissenbachschlucht gvidata de Verena CHAVES-WALDER. Renkontiĝo ĉe la stacidomo de Flawil je la 9h30. Informoj ĉe Verena CHAVES-WALDER, Ruhbergstr. 11, 9230-Flawil. ✆ 071 393 41 49.

**Septembre 5:** Lumbilda raporto de Stanislaw POCHANKE pri la 5-a Tutamerika Kongreso de Esperanto en Meksiko.

**Oktobre 3:** Temo elektota.

**Novembre 7:** Esperanta gazetaro kun Stanislaw POCHANKE.

**Decembre 5**: Zamenhofa Vespero.

# Zürich

## Esperanto-Societo Zürich

**Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 ZÜRICH**
**✆ 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>**

Kunvenoj: la 2-an lundon de la monato je la 20h00 en Esperanto-Librejo, Akazienstrasse 6, 8008 Zürich

### Ĝenerala kunveno 2001 13-an de februaro Protokolo

**Ĉeestis:** Elisabeth EISENEGGER, Armin WEIDMANN, Lidia ROTH, Dieter ROOKE, David YAKI, Alice KESSLER, Dietrich WEIDMANN, Nelida WEIDMANN (nur parton kaj senkulpiĝis por la protokolado, ĉar ŝi devis enlitigi la infanojn).

1) Salutvortoj de la prezidanto

2) Oni ne petis laŭtlegon de la lastjara protokolo kaj akceptis ĝin sen diskuto.

3) **Raporto de la estraro**:

La lasta jaro estis agadriĉa. La du kulminaj aktivecoj estis unuflanke la stando en septembro antaŭ la stacidomo de Stadelhofen, dum kiu kun-

helpis David YAKI, Dieter ROOKE, Jan Stanisław SKORUPSKI, Nelida, Linda, Jasmin und Dietrich WEIDMANN; kaj aliflanke la orient-svisa semajnfino kun Claude GACOND, dum kiu partoprenis entute pli ol 30 personoj. Precipe memoriga estis la esperanto-teatraĵo, kiun dum tiu semajnfino prezentis la infanoj de la lernejo Matenroso.

Venis al ni dum la jaro 2000 entute 224 informpetoj ĉefe tra nia interretpaĝo, al kiuj ni ĉiuj persone respondis. Ĉiuj el tiuj, kiuj deziras esti plu informitaj estis enmetitaj en nian dissendoliston. Rezultiĝis unuflanke plena kurso, kaj aliflanke ni povis vendi plurdek lernolibrojn.

Ni decidis rezigini pri propra informbulteno sed anstataŭe abonigi ĉiujn niajn membrojn kaj personojn sur nia informlisto al *SES informas*, eĉ se tiuj personoj ne tuj aliĝas kaj kotizas. La sperto montriĝas, ke post iom da tempo tiuj personoj aŭ membriĝas aŭ diras, ke ili ne plu volas la materialon.

Okazis dum la jaro 2000 kurso kun 9 lernantinoj.

**Informado per gazetanoncoj:**

Dank' al la malavara donaco de Hans KÄSTLI ni povis fari anoncojn en diversaj gazetoj. Ni publikigis anoncojn en la WIR-gazeto, Brückenbauer, Planeta, WoZ, Vorwärts, la kalendaro de la katolika lernejo kaj en Züriberg. La konkludo je la jarfino estas, ke la et-anoncoj en Brückenbauer estas la plej efikaj: Je kosto de CHF 30 oni atingas semajne 1'000'000 da legantoj. Tion ankaŭ pruvas la reagoj.

Menciindas la elsendoj en radio Lora, kiujn ĝis fino de la jaro redaktis Jan Stanisław SKORUPSKI. Tiujn elsendojn nun transprenos ESZ iom post iom kaj planas ankaŭ disaŭdigi esperanto-kurson.

La estraro kun bedaŭro konstatas, ke la monataj kunvenoj estas nur tiam bone vizitataj, kiam la prezidanto disendas apartan invitilon al la membroj. Ni atentigas, ke nia programo troveblas en SES informas kaj sur nia retpaĝo:

www.esperanto.ch/zuriko

kaj ke nur tiam ni dissendas apartan informilon, kiam io en *SES informas* ne povis akurate aperi.

## 4) Raporto de la kasistino, Elisabeth Eisenegger

La jarkalkulo montris enspezojn de CHF 645.55 kaj elspezojn de CHF 1802.15, el kio rezultis malprofito de CHF 1057.80.

Tiu kalkulo ne enhavas spezojn kaj elspezojn de la prezidanto kaj la sekretario kaj de la prezidanto anticipe pagitajn anoncojn, kiuj ne estis liveritaj antaŭ la fino de la komercjaro kaj tial ili nur eniros la kalkulon de 2001. Oni devas krome konstati, ke pluraj membroj kotizis

en 1999 jam por 2000, kio kreis profiton en 1999 kaj grandigis la malprofiton en 2000.

La malprofito tamen ne estas maltrankviliga, ĉar ni ja ricevis la donacon de Hans KÄSTLI kun la celo fari anoncojn kaj ne kun la ideo lasi tiun sumon putri sur la ŝparkonto. La kreskanta nombro de interesuloj kaj lernantoj pravigas tiun politikon. La estraro ne proponas altigon de la kotizo, tamen alvokas niajn membrojn per donacoj subteni nian societon.

**Raporto de la kaskontrolanto, Armin Weidmann:**

La reviziisto konstatis, ke la librotenado estas bone kaj klare superrigardeble aranĝita de la kasistino. Tial li proponas per aplaŭdo danki la laboron kaj akcepti la kasraporton.

La kasistino kaj la cetera estraro estis sekve al la raportoj unuanime senŝarĝitaj.

**5) Estraro:**

Neniu el la estraranoj demisiis kaj ne estis proponitaj novaj estraranoj, tial la ekzistanta estraro unuanime estis konfirmita por nova oficperiodo. Same por la kaskontrolantoj.

Je propono de Dieter ROOKE mem, kiu trovis subtenon de la estraro, oni donis al li en la estraro oficiale la postenon reprezenti ESZ-n ĉe KCE, al kies ĝenerala kunveno ni rajtas pro niaj regulaj kontribuoj sendi reprezentanton.

La nova (kaj malnova) estraro estas: prezidanto: Dietrich Miĥael WEIDMANN; sekretario: Nelida WEIDMANN GONZÁLEZ-FONSECA; vicprezidanto: Martin MEYER; kasistino: Elisabeth EISENEGGER; reprezentanto ĉe KCE: Dieter ROOKE; kaskontrolantoj: 1-a Armin WEIDMANN, 2-a Vreni ELSNER.

**6) Buĝeto:**

Estis decidite, ke la esperanto-T-ĉemizoj kreitaj de Dietrich kaj Nelida estas por pluvendado akiritaj de la societo. Ĉar por CHF 507 jam estas venditaj ĉemizoj kaj la tuto kostis CHF 1000, la societo povas akiri la restantajn 39 plenkreskul- kaj 6 infanĉemizojn por CHF 493. Necesas vendi nur ankoraŭ 17 ĉemizojn por kovri la kostojn. Se ĉiuj vendiĝos, eblos akiri profiton de CHF 758.-. Realisme estas tamen buĝeti por tio ĝis fino de 2003.

La membraro sugestis, ke oni anoncu same kiel en Brückenbauer ankaŭ en la Coop-gazeto.

La estraro anoncis, ke dum la jaro ni transigos la monon de la kantona banko al la WIR-banko, ĉar tie ni akiros pli altajn interezojn. Krome ni devos inter-konsenti kun SES pri abon-prezo por *SES informas*. En nia listo troviĝas 99 adresoj. El tiuj almenaŭ 23 estas jam SES-membroj kaj tial ili ne devas esti kalkulitaj,

ĉar jam pagis mem la abonon. De la restantaj 76 proksimume 26 troviĝas ekster nia teritorio, laŭ ni tiuj kostoj devas estis portitaj de SES. Laŭ Claude GACOND la produkto-kostoj de unuopa numero kun la afranko estas averaĝe CHF 2.50, tio donus po CHF 125 por numero, do sume CHF 750 jare. Konsiderante, ke tiu dissendado ankaŭ estas reklamo por SES, kaj ke iam post iam parto de tiuj personoj aliĝos al SES pro la ricevo de la revuo, ni opinias, ke ĝustus dividi tiujn kostojn inter ESZ kaj SES (ni ankaŭ konsideru, ke la gazetanoncoj de ESZ en Brückenbauer, WOZ kaj Vorwärts efikas multe por SES, kaj estas ja pagitaj de ni). Ni tial metos en nian buĝeton CHF 375 por *SES informas*. Ankaŭ buĝeti ni devas CHF 200 por nia subabono al Argus kaj CHF 200 por nia kontribuo al KCE. Ne estis jam petita la repago de retenimpoŝtoj por 1999 kaj 2000. Tiu sumo do eniros la buĝeton 2001.

La ĝk-o unuanime decidis kontribui al la agado en Kunming per CHF 500. Amikaro Esperantisto siaflanke kontribuos per CHF 300.

Ni transdonos la enkasigon de la mono por la ŝuldleteroj siatempe ricevitaj de Hans KÄSTLI al fakulo (Treuhandbüro). Ni ja devas CHF 1000 utiligi tiu-cele. Enspezon ni ne buĝetos pro nescio pri la sukceso de la enkasigo.

La buĝeto por 2001 tial aspektos jene:

| | **Enspezoj CHF** | | **Elspezoj CHF** |
|---|---|---|---|
| kotizoj | 400.00 | afrankoj | 200.00 |
| vendoj T-ĉemizo | 290.00 | kontokostoj | 50.00 |
| interezoj | 300.00 | gazetanoncoj | 3'500.00 |
| retenimpoŝtoj | 300.00 | aĉeto T-ĉemizoj | 493.00 |
| donacoj | 500.00 | subteno Kunming | 500.00 |
| licencoj el kursoj | 250.00 | kopioj | 150.00 |
| | | argus-subabono | 200.00 |
| | | gazetabonoj por centra biblioteko | 100.00 |
| | | varbiloj | 250.00 |
| | | enkasigokostoj | 1000.00 |
| **sume** | **2'040.00** | sume | **6'443.00** |

La deficito antaŭvidebla en 2001 estos do CHF 4403. La ĝenerala kunveno unuanime akceptis la buĝeton.

**9) Programo, agadoj:**

Krom la monataj kunsidoj kaj la gazetanoncoj ni antaŭvidas en junio kune viziti la ĉinan ĝardenon donacitan de la urbo Kunming. En aŭtuno ni organizos okaze de la eŭropa tago de la lingvoj standon kaj kultursemajnfinon. Ni okazigos novajn kursojn en majo kaj oktobro kaj ankaŭ realigos la kurson en radio Lora. Por la klerigo de la membroj ĉiam la duonan horon antaŭ la monata kunveno estonte okazos gvidata konversacia rondo por plibonigi la lingvo-sciojn.

**10) Diversaĵoj:**

Sub diversaĵoj restis propono de Dieter ROOKE, submeti al SES proponon aldoni al sia celaro la lingvan klerigon de la membraro. Oni taskis la prezidanton de ESZ, kiu ja estas membro de la SES-estraro, subteni en SES, ke tiu propono eniru la diskuton pri la strategia celaro de SES anstataŭ esti prezentita en la ĝenerala kunveno.

La protokolanto:
Dietrich M. WEIDMANN (en anstataŭo de Nelida)

# RADIO

La sabaton 17-an de marto la radioelsendejo France Culture aŭdigis dum tuta horo tre pozitivan elsendon de Jean-Paul LESCUR (ortografio ne certa) pri planlingvoj kaj esperanto. Ni pli detale raportos pri tiu evento, kiam ni estos povintaj aŭskulti registraĵon el ĝi. Sed laŭ retmesaĝo de Nicole Margot jen jam kelkaj sciigoj:

*"Tuthazarde mi ĵus aŭdis interesegan elsendon pri planlingvoj kaj esperanto. En ĝi parolis iu Jean-Claude LESCUR (ortografio ne certa). Ŝajne ne esperantisto, sed scienca fakulo pri planlingvoj. Libro de li baldaŭ aperos: "Volapük kaj Esperanto". Mi ne notis la eldonejon. Estis interese aŭdi iun paroli serioze pri nia lingvo, de ekstere. Lia konkludo pri nia afero eĉ estas sufiĉe pozitiva kaj povas redoni esperon al samlingvanoj, kiuj ĝin perdis. Etaj detaloj, normalaj por neesperantisto (ekz. ligi -Ido- al -ideo-). Sola ebla malforto: la opono de la solvo -esperanto- al plurlingvismo, evitante tiel la propedeŭtan helpon de esperanto, kiu ankaŭ favoras plurlingvismon. Sed povas esti, ke tio normalas, ĉar tiu elsendo ne estis propaganda. Eble ĝuste pro tio, certe pli sukcesa laŭ propaganda vidpunkto. Ia recenzo de la aperonta libro estus perfekta artikolo por la revuo "Babylonia", kiu*

*ankaŭ havas sciencan nivelon. La elsendo kaj la libro nepre povas alporti multon ankaŭ al esperantistoj."*

## Ni konatiĝu kun Willy NÜESCH

**(sekvo el la paĝo 1-a)**

Lastpaĝe al la libro *Kiel oni akiras ekkonojn pri la superaj mondoj* Willi NÜESCH donas la liston de la 13 verkoj de Rudolf STEINER, kiujn li jam esperantigis. Impona laboro, ĉu ne! Espereble li nun energie daŭrigos la memeldonon de tiuj verkoj laŭ same plaĉa aspekto, donante al esperantujo la eblon renkontiĝi kun la daŭre aktuala penso de Rudolf STEINER.

Kiam oni legas libron en esperanta versio, oni ĝenerale ne nur ŝatas disponi pri biografiaj informoj pri la aŭtoro mem de la verko, sed ankaŭ pri ĝia esperantiginto. Tial mi informcele ekrilatis kun Willy NÜESCH por pli bone konatiĝi kun li. Kaj mi sentas la bezonon transdoni al vi la sciojn, kiujn mi akiris.

Willy Nüesch naskiĝis la 9-an de majo 1927 en la kantono St. Gallen en Diepoldsau, kie li frekventis la lernejojn. Poste gimnaziano en St. Gallen li studis la latinan, grekan kaj hebrean lingvojn. Pro sia prilingva intereso samperiode li studis esperanton en la jaroj 1944/45 kaj la 2-an de junio 1946 li jam ricevis, post ekzameniĝo en St. Gallen, la superan diplomon por la instruado de esperanto, kiu estas subskribita de d-ro Marcel Jaccard. Sekve al tio Willy Nüesch gvidis kurson de esperanto en Rheineck.

En la universitato de Zürich li studis germanistikon dum unu semestro kaj teologion protestantan dum du semestroj. Intertempe li konatiĝis kun la antropozofio de Rudolf STEINER kaj ankaŭ kun la "komunumo de la kristanoj", movado por religia renovigo, kiu ŝuldas sian ekeston al la helpo de Rudolf STEINER. En la jaroj 1949-1951 Willy NÜESCH vizitis en Stugart la seminarion de tiu ĉi religia movado.

Kaj ekde 1952 ĝis nun li laboras kiel pastro en tiu ĉi komunumo. La lokoj de lia profesia agado estis Nürnberg,

Zürich, Essen, Rendburg kaj ekde 1966 Bern.

Longan tempon Willy NÜESCH ne plu aktivis kiel esperantisto. Al la lingvo li revenis en 1977 ektrandukante el diversaj germanlingvaj verkoj, precipe de C.-F. MEYER, Christian MORGENSTERN, NOVALIS, GOETHE kaj SCHILLER.

Tiu enprofundiĝo en esperanton kaj en antropozofion kondukis Willy NÜESCH al esperantigo ankaŭ de la verkaro de Rudolf STEINER, kaj el tiu ĉi laboro ni ekricevas la unuajn fruktojn.

"*Laŭ mia kompreno,* skribis al mi Willy NÜESCH, *la antopozofia movado apartenas al la plej gravaj spiritaj kristanaj movadoj de nia tempo. Eble ankaŭ miaj tradukoj povos iomete helpi dis-vastigi, diskonigi tiun spiritan impulson.*"

Ni konklude diras al Willy NÜESCH: "Do kuraĝon por la daŭrigo de la entreprenita publikigo de la verkaro de Ruldolf STEINER en la lingvo esperanto!

La aĉetemuloj sciu, ke la menciitajn librojn ili povas akiri ĉu rekte ĉe Willy NÜESCH, Brückfeldstrasse 11, 3012 Bern, ĉu ĉe la libroservo de UEA.

Claude Gacond

## La plej granda esperanto-katalogo en la interreto

La Internacia Esperanto-Muzeo de Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu posedas la plej grandan planlingvan bibliotekon, realigas ekde 1996 unikan projekton: kreon de elektronika katalogo, kies nomo estas TROVANTO. Ĝi konsulteblas interrete. En Januaro 2001 troviĝis en ĝi jam pli ol 12'000 registritaj dokumentoj, kaj tiu ĉi nombro kreskas ĉiumonate je pluraj centoj. Jam nun ĝi estas tutcerte la plej granda katalogo pri esperanto kaj interlingvistiko. Jen ĝia retadreso: http://euler.onb.ac.at/cgi-allegro/maske.pl?db=esperanto

## Retadreso de David YAKI

David YAKI, kiu interese prelegis en multaj grupo nun reveturis al sia kara Kanado. Kiuj deziras resti en kontakto kun li, tiuj bone notu lian retadreson: info@esperanto-antauen.com